

SVENSKA
ESPERANTO-
TIDNINGEN

La Espero


2000:5-6

15-a de decembro:
Tago de la esperanto-libro
Nun ankaŭ kun eLibroj

eLibroj - Netscape 6 {Build ID: 2000092911}

http://www.esperanto.se/eLibroj Search

Home My Netscape

 **eLibroj**
Elektronikaj esperanto-libroj

Esperanto-libroj en pdf-formo
Kopiu ilin av via durdisko kaj malkompaktigu
legadon!
Legeblas per [Acrobat Reader](#) de Ad

JUNULARAJ KAJ INFANAJ LIBROJ

L. Frank Baum	La mirinda sorĉisto de Oz
L. Frank Baum	La eksterordinara lando Oz
L. Frank Baum	Ozma de Oz
L. Frank Baum	Doroteo kaj la sorĉisto en Oz
L. Frank Baum	La vojo al Oz
L. Frank Baum	La smeralda urbo de Oz
L. Frank Baum	La mikscifona knabino de Oz
L. Frank Baum	Tiktoko de Oz
L. Frank Baum	La birdotimigilo de Oz
L. Frank Baum	Rinkitinko en Oz
L. Frank Baum	La perdita princino de Oz
L. Frank Baum	La stana lignohakisto de Oz
L. Frank Baum	La magio de Oz

La volo de l'ĉielo
Imago pri Ĝingis Ĥano
Artur Lundkvist
El la sveda tradukis
Bertil Nilsson

INKO

Document: Done

LA ESPERO

Organ för Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694
Decembro 2000 • 88-a jarkolekto
Fondita en 1913

Redaktion:

Jan Setréus
Janko Luin (layout)

Frågor om prenumeration o. dyl.:

Esperanto-Centro, Vikingagatan 24,
113 42 Stockholm, tel. 08-34 08 00

E-post: espero@esperanto.se

Ansvarig utgivare: Leif Nordenstorm

Utformning: Omnibus Typografi, Tyresö

Tryck: HA Reklamtryck, Stockholm

Prenumeration 2000: 180 kr.

Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i medlemsavgiften. Postgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

NI PREZENTAS



Jessica

ESPERANTOFÖRBUNDET

Adress: Esperanto-Centro,
Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,
tel. 08-34 08 00, fax 08-34 08 10

E-post: sef@esperanto.se
Nätsida: www.esperanto.se

Öppettider: Esperanto-Centro har flexibla öppettider
dagtid. Ring i förväg!

Postgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

Medlemsavgift 2000:

Direktansluten medlem 180 kr.
Ungdomsmedlem (max 20 år) 90 kr. Medlemmar under
30 år är samtidigt medlemmar i SEJU, Sveriges Esperan-
tisters Ungdomsförbund.
Hel familj 270 kr (inklusive ett exemplar av *La Espero*.
Tilläggsexemplar kostar 90 kr/år).

ESPERANTOFÖRLAGET

Adress: Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm

Telefon: 08 - 34 08 00

Fax: 08 - 34 08 10

Postgiro: 578-5

Nätsida: www.esperanto.se/eldona


Telefontid: Samma som Esperanto-Centro Stockholm.
Skriftliga beställningar expedieras under hela året.

Styrelsens ordförande: Bertil Nilsson

Manusstopp den 31/1 2001

Manus till *La Espero*
sänds till Jan Setréus
Mörtgatan 7 SV, 133 43 Saltsjöbaden

telefon/fax: 08 - 717 75 67
e-post: jan.setreus@spray.se

La Espero estas presata  sur recikligita papero.

Jag föddes vid 15 års ålder, eller möjligtvis 16. Det var nämligen då min första introduktion till esperanto skedde via ett litet Macroprogram skrivet av den mer eller mindre kände brittiske esperantisten Michael Urban. Mitt tidigare liv känneteckades i stort sett av stor allmänbildning, vilket motvägdes av en grav brist på erfarenhet med mänskliga kontakter och därmed även omväxling. Därför blev debuten också som den blev, informell och tillbakadragen – och lite av en antiklimax, eftersom jag inte hade någon att prata med.

Mina språkliga ambitioner ägnades en kort tid helt åt spanska eftersom högstadieskolan jag gick på bara lärde ut grundläggande tyska, vilket är ett av tre språk jag kan flytande och därför förstäligen nog var ganska tråkigt att plugga. Dock hade ett frö sått i mitt undermedvetna, och när jag, ett halvår innan jag skulle börja på gymnasiet, fick se en artikel om hur Henrik Randehed ämnade införa esperanto som valbart ämne på Olympiaskolan, slog fröet rot och började gro. Det första jag gjorde var att kolla upp namnet Randehed i telefonkatalogen – ett halvår senare började min barndom.

Ungdomsrörelse

Min barndom i esperantorörelsen varade i ungefär tre år som var både roliga och omväxlande. Jag fick stifta bekantskap med allt vad esperantorörelsen har att erbjuda, bl.a. att få träffa nya människor som inte är helt urlåsta och som man t.o.m. kan prata med. Mitt första försiktiga resande inleddes, bl.a. till en kurs i Lesjöfors som var mycket givande. Erfarenheter fick man också, bl.a. när jag försökte upprepa succén på

Olympiaskolan på mitt eget gymnasium, vilket tyvärr inte gick riktigt så bra som beräknat – men vann mig en ny vän som jag fortfarande har kontakt med. Jag kom även i kontakt med föreningsarbete för första gången, då jag valdes till sekreterare i Aktiva Esperantoklubo de Helsingborg.

Men alla barn ska växa upp någon gång och bli bångstyriga och förvirrade tonåringar... och uppleva kärleken. Stående inför den lite prekära situationen att riskera ordförandelöshet sammankallade det extraordinära SEJU ett hastigt ihopsängt extra årsmöte i december 1998, som förlades i Helsingborg för att det är kul med lite omväxling. Det blev bättre än så – på detta möte fick jag nämligen stifta bekantskap med den charmiga och pratglade ledamoten Janko Luin. En vecka senare var vi ett par, och är så än idag.

Styrelseposter

Mín tonårstid har nu varat i grova två år och varit en hel räckta av erfarenheter: två styrelseposter – först vice sekreterare och nu sekreterare i SEJU (den enda skillnaden är egentligen titlarnas imponeringsfaktor, eftersom den dåvarande sekreteraren påpassligt nog aldrig var närvarande på mötena) – styrelsemöten, UK i Berlin, en kurs ledd av den framstående esperantisten Atilio Rojas, E@I... listan kunde göras mycket längre, ifall jag orkade. Under min uppväxt har jag fått ännu en mycket god vän tack vare esperanto, och jag ser fram emot min vuxendom med spänning och tillförsikt. För vem vet, vad framtiden har att komma med?

Jessica Hanmeier

eLibroj en eLibrejo

La 15-a de decembro, naskiĝtago de L.L. Zamenhof, estas samtempe la tago de la esperanto-libro. Multaj aktivaj kluboj dediĉas kunvenon komence de decembro al libroj.

Apud la tradiciaj libroj komencis aperi libroj, kiuj ne tre videblas, sed kies enhavo ofte estas identa kun libroj, kiuj prenas lokon en librobretoj.

Temas pri elektronikaj libroj, aŭ eLibroj, legeblaj sur ekrano. La tekniko por distribui tiajn librojn komencas esti preta nur nun, eĉ se la solvo ekzistis jam de kelkaj jaroj. Uzantoj de komputoraj programoj ofte ricevas la manlibrojn sur la k-disko de la programo en t.n. pdf-formato.

Eldonejoj ne ekuzis tiun formaton por distribui librojn, ĉar ne estis preta solvo, kiel ili prenu pagon por tiaj libroj kaj kiel ili malebligu nelegan kopiadon. Nun tiaj solvoj estas pretaj kaj oni atendas, ke baldaŭ okazos eksplodo en la eldonado de eLibroj.



Avantaĝoj ...

Tiu, kiu interesiĝas pri libroj scias, ke ili emas okupi pli kaj pli grandan spacon en la loĝejo. eLibroj konsistas el dosieroj, kiujn oni povas distribui interrete aŭ per k-diskoj. Unu k-disko povas facile enteni eĉ kelkmil diversajn titolojn, t.e. la tuta kvanto da esperanto-libroj iam eldonitaj povus facile esti transportata en poŝo (se ĝi estas iom granda).

Havigo de libro (mendo kontraŭ pago aŭ senpaga elŝuto el interreto) estas afero de kelkaj minutoj.

Por eldonejoj estas la avantaĝo, ke ili ne bezonas investi en grandan stokon da paperaj libroj, kiuj eble malrapide vendiĝos.

... kaj malavantaĝoj

eLibroj postulas komputoron por esti legataj. Tiu, kiu havas porteblan maŝinon povas trovi tion komforta, sed sidi antaŭ granda, peza ekrano ne ne-

pre estas via plej ŝatata maniero legi librojn.

Komencas aperi legotabuletoj, laŭ grandeco similaj al libroj, sed ili estas tro kostaj por ordinara leganto. Certe la evoluo dum 2001 rapide kondukos al pli kaj pli malmultekostaj solvoj, sed temas en ĉiu kazo pri ioma investo.

La literoj ne aperas same akre sur ekrano kiel sur papero. Ankaŭ la tekniko sur tiu kampo rapide pliboniĝas.

Partoprenas jam dekomence

Esperantistoj partoprenas tiun evoluon de la libromarkato jam dekomence. Ekzistas jam minimume sesdeko da diversaj eLibroj, aperintaj en diversaj partoj de la mondo, de Aŭstralio kaj Brazilo al Svedio. Antaŭ ne longe "malfermiĝis" eLibrejo, en kiu aperas informo pri senpage haveblaj eLibroj en esperanto. Vi trovas ĝin i.a. ĉe <http://esperanto.nu/eLibrejo>.

Je la unua rigardo oni surpriziĝas pri la kvanto da titoloj de infanaj kaj junularaj libroj. Estas havebla preskaŭ la tuta serio de libroj pri la lando Oz kaj tri libroj pri Alico de la verkisto Lewis Carroll. Sed ankaŭ nia propra Astrid Lindgren jam aperas en eLibrejo per *Pipi Strumpolonga*, la komenco de la libro pri *Ronjo* kaj baldaŭ ankaŭ per *Emilo en Smolando*.

Ankaŭ cetere legeblas svedaj aŭtoroj. Reaperis pluraj libroj de Selma Lagerlöf, kiuj ne estis aĉeteblaj dum jardekoj, kaj de August Strindberg, same nehaveblaj. Kelkaj tute novaj titoloj aperas nur elektronike, ekzemple *La vojo de l'ĉielo* de Artur Lundkvist, en traduko de Bertil Nilsson. Pretas jam kelkaj titoloj de Eldona Societo Esperanto kaj Al-fab-et-o, kiuj ekzistas ankaŭ en papera eldono, i. a. *Denaska kongresano* de Sten Johansson. La intenco estas per eLibro montri, kiel interesaj la libroj estas, kaj instigi la legantojn al aĉeto de la papera eldono, kiun ili povos legi komforte kuŝante sur sofo aŭ en lito.

Ĉefe reeldonoj

Cetere temas ĉefe pri reeldonoj de libroj ne plu troveblaj ĉe la libroservoj. Pluraj el ili aperas en iom modernigita lingvo, precipe kiam la origina traduko estis farita, kiam esperanto ne estis tre evoluinta. Vi povas trovi en eLibrejo unu el la unuaj tradukaĵoj al esperanto, *La neĝa blovado* de Aleksander Puŝkin, farita de Antoni Gra-

bowski en 1888, sed pli multaj devenas de la 1930-aj jaroj.

Parte novtradukita estas unu el la plej amuzaj libroj, kiujn mi konas, *Tri viroj en boato* de Jerome K. Jerome, kiu ekzistas nur kiel eLibro. En la pli frua traduko eĉ la titolo estis erara ("Tri homoj en boato"), tial la novtraduko estas tre bonvena. Se vi ne scias, kion fari dum la kristnaskaj kaj novjaraj tagoj, elŝutu tiun libron kaj havigu al vi multajn ridoplenajn horojn.

Instigas al eldonado

Ĉar eldonado de eLibroj ne estas same monpostula kiel ordinara eldonado, oni povas atendi, ke la esperanto-eldonado utiligos ĉi tiun teknikan ebeldon. Verkistoj kaj tradukistoj, kies manuskriptoj kuŝas en tirkestoj kaj neniam atingas la publikon, povos pli facile aperigi siajn verkojn. *La vojo de l'ĉielo* de Artur Lundkvist estas tia libro, kaj same diversaj libroj, kiuj direktas sin al infanoj.



Ankaŭ la koncepto de eldonejo kaj librovendejo/libroservo ŝanĝiĝos, kiam verkistoj povos mem decidi pri la diversaj ŝtupoj. Estos tamen bezonataj iaspecaj pereojoj, kie legantoj povos ricevi informon pri ekzistantaj titoloj, kaj eLibrejo intencas esti tia pereojo, kaj por la senpagaj kaj por pagendaj eLibroj.

Mi volonte akceptas informojn pri pliaj pretaj eLibroj kaj povas konsili kiel pretigi novajn.

Franko Luin
franko@esperanto.se

Ipmirdat go don sámigiela?

Ĉu vi parolas la samean?

Tio estas mia lingvo la samea, kaj mi parolas la nordan dialekton. La samean oni parolas en la norda parto de Skandinavio kaj ankaŭ en la duoninsulo Kola. Kiom da personoj parolas la lingvon? Estas iomete malfacile diri, eble dekmil, ĉar multaj homoj perdis la lingvon.

Foto

De la maldekstro: cinal (ornamaĵo), náp'pi (ligna melkositeleteto), guksi (arĝenta kulerego), skap'pu (ligna skatolo)



Dum la dudeka jarcento komencis esti pli kutimaj miksitaj geedzeco kaj kiam iu edziĝis kun persono kiu ne estis sameo la infanoj ofte ne lernis samean. Oni ne komprenis, ke la lingvo estas tre grava kaj ke ni devas protekti ĝin. La samea lingvo apartenas al la finno-ugra lingvogrupo, sed la diferenco estas tro granda por ke ni povu kompreni la finnan.

La lingvo ĝenerale estas dividita en tri grupoj; suda, lule- kaj norda dialektoj. La suda dialekto estas proksimume de Härjedalen ĝis Arvidsjaur, lule-dialekto proksimume ĝis Gällivare kaj la norda dialekto norde de Gällivare. La dialektoj sekvas la latitudojn ne la ŝtatlimojn, ekz. la suda dialekto en Svedio estas la sama kiel la suda dialekto en Norvegio.

Ĉar la samea estis parola lingvo ne ekzistis skriblingvo antaŭe, sed dum la dudeka jarcento oni komprenis ke devas esti skriblingvo kaj ankaŭ lernolibroj.

Do persono kies nomo estis Israel Ruong kreis la unuan praktike uzatan version de skriblingvo. Sed kun la tempo la versio estis ŝanĝita iomete. La problemo estis, kiun dialekton li elektus, ĉar ĉiuj aliaj kiuj ne uzas tiun dialekton devas lerni ĝin se oni volas skribi aŭ legi la samean. La unua skribversio estis la dialekto de Nordnorvegio. Nuntempe ankaŭ ekzistas skriblingvo en la lule-kaj sudsamea.

La alfabeto

a á b c ĉ d d e f g h i j k l m n n o p r s s t t u v z z z

La samea havas kelkajn specialajn literojn:

- a malvasta a
- á vasta a
- c c en esperanto
- ĉ tj ĉ en esperanto
- dh d kiel voĉa lispa s
- n kiel ng en sonoro ding deng dong
- ŝ sj ŝ en esperanto
- t tt kiel lispa s
- z kiel ds
- ž kiel dŝ
- o kaj u prononciĝas same kiel en Esperanto.

Personaj pronomoj

mon mi
don vi
son ĝi (li kaj ŝi ne ekzistas)

moai ni du
doai vi du
soai ili du

min ni (pli ol du)
din vi (pli ol du)
sin ili (pli ol du)

Verboj

Per ŝanĝo de verbfinajoj oni povas determini se estas singulara, duala aŭ plurala, ekz.:

singularo
boran mi manĝas
borat vi manĝas
borra li manĝas

dualo
borre ni du manĝas
borrabahtti vi du manĝas
borrabahttet ili du manĝas

pluralo
borrat ni (pli ol du) manĝas
borrabehttet vi (pli ol du) manĝas
borret ili (pli ol du) manĝas

Kazoj

En la samea estas sep kazoj.

nominativo
mus lea oab' bá mi havas fratinton
akuzativo
mon oáden oabbá mi vidis la fratinton
genitivo
oabbá namma lea Anne la nomo de la fratino estas Anne
inesivo-elativo
attán oab' báí gáfe mi donas kafon al la fratino
lokativo
oabbas lea beana fratino havas hundon
komitativo
mon vulgen oabbáin mi iris kune kun la fratino
esivo
Anne gal oab' bán navdán Anne mi veronomas fratinton
En la samea, kiel en esperanto, la vortordo ne estas grava.

Demandoj

Estas naŭ diversaj vortoj por "ne", tamen oni preferas respondi per klarigo anstataŭ nur per simpla "ne".

Kiam oni respondas demandon oni ne nur diras jes aŭ ne.

Se iu demandas:
lae go dus beabmo? – "Ĉu vi havas mangajon",
oni donas la respondon:
mus lea biebmo – "Mi havas mangajon", ne nur jes.

La vorto go respondas al ĉu en esperanto.

demandvortoj:

mii	kio
gii	kiu
gen	kies
maikkar	kia
gos	kie
gosa	kien
goaise	kiam
mo, go	kiel
man	kiom
manin	kial

Vortrezoro

Ĉar la vivo de la sameoj dependis de la boacoj estis tre grave ke oni povis priskribi la cirkonstancojn por la boacoj per ekzaktaj vortoj. Tial ekzistas multaj vortoj por boaco.

Ekz. por boaco. Kiom aĝa? Virbesto aŭ ino? Ĉu ŝi havas idon? Ĉu la boaco havas kornon? Ĉu ĝi estas kastrita? Kelkaj vortoj por boacoj:

aldu	boacino kun ido
rodno	boacino sin ido
sarva	ne kastrita virboaco
heargi	kastrita virboaco
varit	dujara virboaco
maikkan	sesjara virboaco

Ankaŭ la neĝo havas multajn diversajn nomojn, ekz. Nova aŭ malnova? Seka? Mola? Dika? ...

Kelkaj vortoj por neĝo:
obbas netuŝita dika neĝo
vacca nova neĝo
ciakki malmola bulo
suovvi malseka neĝo

En Esperanto mi trovis tri sameajn vortojn;

boaco (El Paul Nylén Esperantisk-Svensk ordbok)
goato (torfokabeno) kaj sejto (sankta objekto) (El Sten Johansson Denaska kongresano kaj aliaj noveloj)
Vortoj por modernaj aferoj oni devas prunti aŭ krei, ekz. politikaj vortoj.

La sameoj neniam faris militon, tiu vorto estas pruntita el la finna.

Mikael Blind

UK: Kongreso en sankta frenezulejo

Dank' al esperanto, mi foje havis okazon viziti lokojn al kiuj mi aliokeze verŝajne neniam venus.

Ekzemple ĉijare. Al la Mezoriento, mi persone havas neniujn ligojn. Israelo/Palestino/Kanaano (forstreku la nedeziratajn alternativojn) estas naskiĝloko de du religioj – unu etna kaj unu monda – kaj grava ankaŭ por alia mondreligio, do por du mondaj religioj el la entute tri.

Sed la unu etna kaj du mondaj religioj de Israelo estas ĉiuj monoteismaj, kaj por mi, praktikanto de la tria – aŭ, kronologie pli ĝuste dirite, unua – mondreligio, la nura el la tri kiu tute ne havas judajn radikojn; por mi ĉiu teisma pensado, kaj precipe la monoteisma, estas tute fremda. Por mi, la sankta lando estas nordorienta Hindio.

Do, esperanto estis por mi kialo viziti alies sanktan landon. (Fakte, ĉar mi nun do vizitis Banarason, Jerusalemon kaj eĉ Upsalon, esence ankoraŭ mankas en mia persona kolekto de gravaj pilgrimlokoj nur Meko – sed se mi irus tien, eĉ esperanto probable ne savus mian vivon. Eniro estas tie strikte malpermesita por ne-islamanoj.)

En Israelo, mi povis konstati ke mi ankoraŭ preferas la sanktajn lokojn de la budhismo al tiuj de la monoteismoj. Kvankam okazis konfliktoj ankaŭ tie – ekzemple inter hinduoj kaj budhanoj en Buddha Gaya – tiuj tamen estis malpli gravaj, kaj cetere la ĉefaj el tiuj lokoj ne estas enurbaj sed apudvilaĝaj, do ankaŭ tial pli trankvilaj.

Tamen, estas bone provi foje kompreni la pensmaieron de aliaj. Kaj la absurdecojn de la homa historio.

Mi skribas ĉi tiun artikolon en momento, kiam la maltrankvilaroj plej plene raportataj – almenaŭ en svedaj amaskomunikiloj – okazas 1. en la lando de la ĉijara UK, kaj 2. en la lando, al kiu ĝis antaŭ ne tre multaj jaroj apartenis la urbo de la venontjara; kaj lastjare, ni kongresis en lando kiu nur kelkajn monatojn antaŭ la UK militis en la lando menciita sub 2.

Ne estas facile eĉ por UEA eviti strangajojn en stranga mondo.

Grandaj partoj de la mondo estis, dum longaj partoj de la historio, fre-

nezulejoj; kaj la ĉijara UK-lando estis plurfoje bona ekzemplo de tio.

Aŭ eble ni diru "UK-regiono", por esti vere neŭtralaj rilate al la lokaj konfliktoj tra la jarmiloj.

Israelo biblia kaj nuntempa

Fakte, la ĉijara kongresa urbo – aŭ la loko kie tiu nun troveblas – estis, dum la malnovtestamentaj tempoj, laŭ la mapoj en miaj du svedlingvaj biblioj (la tradukoj de 1917 kaj 1999), ne parto de la tiama Israelo. Ĝi estis tiam teritorio filiŝta, do posedajo de popolo kiu, kvankam nun malaperinta (same kiel la kanaanidoj), intertempe donis sian nomon al Palestino; sed la nunaj palestinanoj ne precipe loĝas tie. (Tamen, inter la diversnaciecaj flagoj ekster la kongresa hotelo, mi vidis ankaŭ la nunan palestinan – almenaŭ io.)

En novtestamentaj tempoj, la regiono de Jafo (kiu nun estas kvazaŭ suda antaŭurbo de Tel-Avivo), jam estis parto de Judeo; sed tiam, Palestino ja estis parto de la romia imperio.

Kaj poste, la judoj estis forpelitaj (almenaŭ oficiale – laŭ kelkaj teorioj, eble kelkaj aŭ eĉ multaj el ili tamen restis, maljudiĝis kaj iĝis, post multaj pliaj peripetioj, la prapatroj de la nunaj arablingvaj palestinanoj islamana kaj kristana); kaj poste, la romia imperio dividiĝis, kun Palestino sub Bizanco; kaj poste, post la falo de Konstantinoplo, sub la turkoj; kiuj poste en 1492, bonvenigis la sefardajn judojn ĵus forpelitajn el Hispanio, pro

kiu la ĉefa lingvo de la palestinaj judoj estis, ĝis antaŭ malpli ol cent jaroj, la judhispana; kaj poste, pro la historia evoluo en Eŭropo, venis pli kaj pli multkvante aŝkenazaj judoj, do samgentanoj de Zamenhof, parte en la nomo de la cionismo, kiu origine deziris en Palestino germanlingvan, sekularan ŝtaton por judoj sed ne judan, devigante arabojn pagi por krimoj de germanoj; kaj poste naskiĝis en Israelo homoj, judaj kaj aliaj, kiuj kompreneble ne respondecas por agoj okazintaj antaŭ iliaj naskiĝoj, kaj kiuj do – same kiel ekzemple eŭropidoj en Ameriko aŭ Aŭstralio, aŭ kiel etnaj svedoj en Laponio – ne havas alian hejmlandon ol tiu, kiun iliaj samgentanoj de antaŭaj generacioj iam fakte ŝtelis.


Solvu tian situacion, kiu kapablas!

Zamenhof cionisto?

Alia strangajo: estas konate ke Zamenhof iam, kiel junulo, apogis la cionismon; kaj estas ankaŭ konate ke li, iom antaŭ sia publikigo de nia lingvo, tute ŝanĝis sian sintenon tiurilate kaj, kvankam li ankaŭ poste havis ian sentimentalnan sopiron al la cionisma revo, tamen intelekte trovis ĝin ne nur nerealista sed profunde malapoginda.

Do, ĉijare ni kongresis en la cionisma ŝtato okaze de lingvo iniciatita de kontraŭcionisto. Nu, oni povas argumenti ke Zamenhof mortis jam en 1917, kaj ni ne povas scii kiun sintenon li havis post la holokaŭsto, se li

Kion fari al tiu Internacia vespero? Leonard Bronŝtejn miras.



Fotoj: Roland Lindblom

Unu el la ekskursoj: Historia vidindaĵo meze de la dezerto.





Kelkaj el la kongresanoj, speciale invitiaj al la oficiala urbestra akcepto.

tiam ankoraŭ vivus.

Vere. Sed ĉar la krimintoj en Germanio kaj la pagantoj en Palestino estis du tute malsamaj homgrupoj, kaj ĉar Zamenhof, se mi lin ĝuste komprenas, ja havis certan senton pri ĝusteco, mi permesas al mi havi miajn teoriojn pri tio.

(La sinteno de Einstein, alikaze, ni ja konas. Li rifuzis iĝi israela prezidento, parte ĉar la lando iĝis juda ŝtato anstataŭ ŝtato por judoj.)

Unika UK

Bedaŭrindan influon el la krokodila mondo mi rimarkis: ordinare, ĉiu UK havas multajn kongresanojn ne nur el la kongresa lando mem, sed ankaŭ el la plej proksimaj najbarlandoj. Ne ĉijare, kaj ne nur ĉar la esperantomovado estas ankoraŭ malforta en ara-

baj landoj. Eĉ irananoj mankis, kaj mi ne scias antaŭ kiom da jaroj tio lastfoje okazis dum Universala Kongreso.

Kaj interesa detalo en la kongresa programaro: Dum ĉiu UK, unu vespero estas kutime dediĉita al prezento de la loka nacia kulturo. Bone, sed kiel fari se la kongresa lando fakte ne estas nacio (krom en la tria signifo de PIV)? Ni spertis tion jam antaŭ dek ses jaroj, en Vankuvero, kie montriĝis ke la kulturo de la anglalingva parto de Kanado estas tute identa kun tiu de Usono.

Israela kulturo

Kaj ĉijare, la israelan kulturon prezentis kant- kaj dancgrupo – el Litovio, do pli najbara al la redakcio de La Espero ol al la LKK de Tel-Avivo.

Tre bona grupo, cetere; pri tio ne eblas plendi. Sed la kongresa libro donis al ĝia programo malĝustan rubrikon. Ĝi prezentis kantojn el Litovio, Pollando kaj Rusio – ne nur aŝkenazajn, sed ankaŭ gojajn – plus kelkajn de judoj sefardaj kaj jemenaj; sed esence, ĝi ne prezentis kulturon de la kongresa lando mem, precipe ne de la homgrupo kiu estis tie la vasta plimulto dum pli ol jarmilo. Ĝi prezentis kulturon nek israelan nek palestinan, sed diasporjudan.

Kiel aludite – la mondo estas absurda, kaj eĉ esperantistoj ne kapablas tion helpi, almenaŭ ne rapide.

Kiel Roland Lindblom menciis en sia artikolo lastnumere, la ĉijara UK estis unika ĉar ĝi okazis ne de sabato al sabato sed de mardo al mardo. La kialo estis simpla: dum la ŝabato (tio estas la sabato 2 de PIV, kiu komencas kaj finiĝas ĉirkaŭ ses horojn antaŭ la sabato 1), nenio funkcias en Israelo, ĉar ĉiuj ripozas... Oficiale.

Praktike, eble ne centprocente. Kiam mi, dum la vendreda vespero – kelkajn horojn post la komenco de la ŝabato – piediris de la kongresejo al la hotelo, kaj aŭdis la sonojn de la urbo, mi silente scivolis ĉu eĉ Javeo komprenas kiun signifon lia elektita popolo donas al la koncepto ŝabat ŝalom, "ŝabata paco".

Sed mi ne plendas. Sabate, multaj el la kongresanoj ekskursis aŭtobuse (per veturiloj de Volvo, kiel kaŝa komenco de la gotenburga UK post tri jaroj). Nun, laŭ la leĝoj de Moseo, ĉiu kiu faras fajron dum la ŝabato – kaj sen fari tion ne eblas funkciigi eksplozadan motoron – rompas ĝian devigan pacon, kaj ĉiu kiu rompas la pacon de la ŝabato estu ŝtonumata.

Do, por la estonteco de nia esperanta komunumo, ni estu dankemaj ke ne ĉiuj israelanoj estas integristoj.

Prenumerationer

SEF erbjuder sina medlemmar att prenumerera på esperantotidningar för 2001. Du beställer tidningarna genom att sätta in pengar på postgiro 14 74 29-5, SEF, specialkonto, samt att på talongen ange vilka tidningar, som avses.

Vill du fråga något ytterligare kan du göra det hos:

Lisbet Andreasson
Södra Rörum pl 455
242 94 Hörby
tel 0415-50152

Tidning	nr/år	pris kr
El Popola Ĉinio upphör med utgången av år 2000		
Esperanta Finnlando	6	120*
Esperanto	11	275
Esperanto Dokumentoj	10	215
Eventoj	23	300*
Retventoj, nästan dagligen		180*
Fonto	12	300
Heroldo	16	250
ICEM	4	165
Informoj de EAE	4	75*
Juna Amiko (rabatt vid mer än 1 ex)	4	95
Komencanto	8	115*
Kontakto	6	165
La Hirundo	8	120
La Jaro (kalender)		47
La Kancerkliniko	5	180
La Ondo	12	210
Literatura Foiro	6	235
Litova Stelo	6	120
Monato	12	360
Norvega Esperantisto	6	85*
Oomoto	2	100
Rok-Gazet	1	140 (tre nummer)
Scienca Revuo	4	185*
TEJO-tutmonde	4	85

* priser för 2001 har ännu inte meddelats. Höjningar kan ske.

Gunnar Gällmo

IJK: Raporto el alia planedo

Kiel sola norvego, mi vizitis la ĉi-jaran IJK en Honkongo. Mi tamen norvego ne estas, oni diras ke svedo mi estas, kvankam mia patrino norveginas, kaj kvankam mi loĝis kaj en Danio, Svedio kaj Norvegio dum mia vivo. Mi fuŝparolas la norvegan kaj danan lingvojn, dum se mi restas en Svedio kelkan tempon mi rememoras kiel eviti norvegismojn. Kio mi do estas?

Se paroli pri hejma lando, mi iel estas kaj restas "skandinavo". Se paroli pri lingvo, vojaĝante tra la mondo, loĝante diverslande, mia hejmo estas kaj restas tiu terana lingvo Esperanto. Ĝi bonas al mi, ĝi restas konstanta, ĉu mi loĝas ĉi- aŭ ali-lande, parolas ĉu al vjetnamo, ĉu al germano. Sed Esperanto, kiel ĉiu alia lingvo plej bonas kiam mi forgesas pri ĝi, ĝin uzante, tiel ke la lingvo nur peras la gravajn informojn, la sentojn beligitajn la vivon, la renkontiĝojn kun homoj kiuj eble al mi fariĝos amikoj.

Tutglobismo, Mondlingvo, Interreto

Neniam mi tion spertis pli klare ol en la ĉi-jara IJK en Honkongo. Tiu travivaĵo estis al mi belega kaj bonis al mia koro. En 33-grada varmo kaj 80-elcenta malsekeco, ni ŝvite ĝuis kunestadon kaj aktivajojn.

Kongresa temo estis "tutglobismo", do ke oni konsideras la tutan homaran mondon kiel unu tuton, kun propra ekzistorajto. Rilate al tio estis prelegoj kaj diskutoj interesaj. Mi kaj

amiko Hokan el Svedio kontribuis per prelego pri Esperanto kaj Interreto, kie ni montris ke Interreto malaperigas la ĉefajn barilojn kontraŭ Esperanto, kaj katalizas aŭ akriĝas la demandon pri mondlingvo. Interreto ankaŭ iom post iom faciligos al homoj eltrovi ke Esperanto ekzistas kaj eĉ ebligas al homoj facile kaj senkoste la lingvon lerni.

"Via mondo tiom grandiĝas"

Estis ankaŭ multaj interesaj programeroj eksteremaj pri diversajoj kaj ĉina kulturo. Estis eblecoj diversmaniere sportumi, ekskursi tago al Honkongo. Tamen al mi ne restas dubo ke la plej daŭra kaj profunda signifo de tiaj kongresoj estas la interproksimiĝo de homaj koroj kaj animoj.

Vojaĝi al Ĉinio unuan fojon al mi impresis kvazaŭ veni al alia planedo, kie eĉ la literoj frape nekompreneblas. Kaj jam alveninte al tia ŝajne fremda planedo, ekkoni homojn el multaj diversaj kulturoj, kune kanti en la malfruj vesperoj, babili, amuziĝi, serioze pridiskuti gravajn temojn, tio al mi


povas nur boni. Tio vastigis mian perspektivon pri la mondo. Tio donas al mi pluan motivigon ĝui vivi ĉi-planede. Junan japanan komencanton mi volas citi: "Se vi parolus kun alilandanoj kun kuraĝo sen honteco, via mondo tiom grandiĝas."

Vojaĝi estas riski

Unu plendon mi ja havas: La ĉina kuirarto tro forlogis min. Post la reveno mi havis problemojn readaptiĝi al la novega principo pri buterpano-tri-foje-tage. Do, ĉiam estas riskoj kiam oni vojaĝas. En tiu ĉi vojaĝo, tamen la bonaj spertoj superis la malbonajn miloble. Mi do boligu la rizon kaj surtabligu la mangbastonetojn, dirante: Dankon IJK! Dankon Honkongo! Dankon gastamaj ĉinoj! Dankon al ĉiuj kies ĉeeston en IJK tiel bonis al mia koro! Dankon al bonaj kunvojaĝantoj! Al Esperanto mi ne per dankoj dankas, sed per vortoj – ĝin uzante.

Henning von Rosen
Tromsø

Neazianoj Hokan kaj Henning meze de Hongkongo. Foto: Henning von Rosen





Renkonto sur ponto

La historia renkontiĝo sur la Sunda ponto okazis [la 10-an de junio] en belega vetero tute laŭ niaj planoj. De Malmö iris Alf Mobark, kiu zorgis pri flagoj kaj reklamo, Karin Rylander, Kjell Persson kaj la familio Svenonius. Sur la ponto ni renkontis Kim Henriksen, Jytte Sunekaer kaj kelkajn aliajn geamikojn. Dekoj da homoj fotis min, kiu iris unue kun dana kaj sveda flagoj!

Sten Svenonius

KORESPONDU

Unue mi volas prezenti min. Mi estas 17-jara japana knabino. Mia nomo estas Ai Katou, Katou estas la familia nomo kaj Ai estas la persona nomo. Mi naskiĝis en la 11-a marto 1983 en Yokohama.

Ai Katou
1-12-9 Tsunashimanishi
Kouhoku-ku,
Yokohama 223-0053
Japanio

Mi esperas trovi iun korespondoamikon en Svedio. Mi ne ŝatas alkoholon, tabakon, skandalon. . . Mi ŝatas librojn pri vojaĝoj. Mi ne estas juna rusa virino. Mia naskiĝtago estas 20 feb. 1943. Mi ŝatas naturon, arbaron, florojn. Antaŭe mi verkis versojn kaj mi ankaŭ ŝatas belan muzikon. S-ino Galina Starostina pr. Makeeva 28-4 g. Miass Celabinskaja obl. RU-456320 Rusio

Filmsekvenco kun Zamenhof en la sveda televido

Dum programo en la sveda televido vendrede la 25-an de aŭgusto subite videblis L.L. Zamenhof dum kelkaj sekundoj, ridetanta kaj moviĝanta. La programo temis pri viraj kravatoj kaj la kravato de Zamenhof evidente vekis intereson ĉe la redaktoro de la programo. Ne estis menciite, ke temas pri Zamenhof. Sten Svenonius el la sudsveda urbo Malmö, kiu rigardis la programon kun sia familio, raportas, ke ili fariĝis tute ravitaj povi vidi Zamenhof vivanta.

(El NUN)

Koncernnamn på esperanto

Jag fick idag [9/10 2000] på jobbet ett följebrev till en av kunderna från Telia med rubriken "Telia katalogverksamhet samlas i Eniro".

- Av brevet framgår bl.a. följande:
- Telias katalogverksamhet med produkter och varumärken som *Gula Sidorna*, *Din Del* och *Emfas* har samlats i en ny koncern – Eniro AB.
 - Den juridiska enheten i Sverige, Telia InfoMedia Reklam AB, byter namn till Eniro Sverige AB. Eniro är vårt nya koncernnamn. Eniro betyder tillgänglighet på esperanto. Tillgänglighet ska känneteckna vår verksamhet både i kommunikationen med Dig som kund och i de tjänster vi erbjuder.
 - Utvecklingen inom IT, en avreglerad telekommunikation och att vi

kan agera som en operatorsneutral leverantör ger Eniro ytterligare möjligheter att utveckla nya marknadsplatser i nya medier.

• Hemsida www.eniro.com
Det vore intressant att veta hur detta gått till! För övrigt, betyder verkligen eniro tillgänglighet? Jag skulle översatte det ordet med alireblo eller dylikt, men det hade kanske inte varit lika lämpat som företagsnamn.

Sten Svenonius

Kurso en Lerum

Ĉe Lerums Gymnasieskola nun okazas Esperanto-kurso kun ok studentoj. La instruisto kaj iniciatinto estas Folke Wedlin, kiu memlernis Esperanton en 1999. La kurso ampleksas 100 gimnaziajn poentojn kaj daŭros ankaŭ dum la printempo.

La kolegoj de Folke ĉe la gimnazio akceptis la novan studfakon bonvole kaj kun intereso; kelkaj el ili eĉ ŝatus lerni Esperanton. Do nun okazas Esperanto-kursoj ĉe du svedaj gimnazioj: en Lerum, kaj ĉe Katedralskolan en Uppsala. (Ĉe Olympiagymnasiet en Helsingborg okazis Esperanto-kursoj antaŭe, sed ne ĉi-semestre. Espe-reble la Esperanto-kursoj revenos en Helsingborgo aŭtune 2001.)

Christer Lörnemark
(El Inter-ligilo 2000:3)

Pompa pomartaĵo

En la belega vilaĝo Kivik, en la plej suda parto de Svedio okazas ĉiujare tradicia aŭtuna pomvendado. Post la mondkonata foirego de Kivik en julio, ĉi tio dum fino de septembro, fariĝis granda popola festo. Multaj homoj vizitis la foiron por aĉeti bongustajn kaj bonodorajn fruktojn. En la tuta regiono ĉirkaŭ Kivik troviĝas grandaj ebenajoj kun amasoj da fruktarboj.

La plej interesa vidindaĵo, dum la foiro, laŭ mi, estas la granda ekspozicio "Tellus aŭ ĉielatero", konstruita de la fama arti-

sto Helge Lundström. La artaĵo konstruiĝis apud la haveno, tabulo 120 kvadratajn metrojn granda. Kune kun kelkaj helpantoj la artisto Lundström fiksis 35.000 pomojn sur pli ol 72.000 najlojn kaj uzis malsame koloritajn pomspecojn. Laŭtakse la tuta pezo atingas ĉirkaŭ 5.000-6.000 kilogramojn kaj kredeble la plej mondkonata pomartaĵo.

La artisto Lundström jam ricevis lokon en la mondkonata libro de Guinness.

Lars Hägg, Simrishamn

Esperanto i Blekinge

I Karlskrona har man numera en grästidning. Den delas ut till alla hushåll. Det betyder att en artikel i nr 6/2000 (s. 18) om esperantisten Sam Fritz fick stor spridning. Informationen kom till La Esperos red. från Knud Rasmussen.

Sam Fritz är pensionerad lärare i historia och religion. Men alltjämt undervisar han, framgår av artikeln. Nu är dock esperanto ämnet, och undervisningen sker på ett studieförbund. Fritz tar inget betalt av eleverna.

Han lärde sig esperanto för sjutton år sedan, sedan en annan lärare talat illa om språket. På en veckoslutskurs fick han en "aha-upplevelse". "Esperanto är ju tio gånger lättare än vilket västerländskt språk som helst - och hundra gånger lättare än ryska." I artikeln antyds hur esperanto kan vara så enkelt.

Avslutningsvis menar Sam Fritz att esperanto borde läras ut i skolorna. "Det finns inget bättre sätt att lära sig grammatik på. Och så alla kontakter det skapar. Själv har jag fått många brevvänner i utlandet."

Red



KORESPONDU

Unue mi volas prezenti min. Mi estas 17-jara japana knabino. Mia nomo estas Ai Katou, Katou estas la familia nomo kaj Ai estas la persona nomo. Mi naskiĝis en la 11-a marto 1983 en Yokohama. Ai Katou 1-12-9 Tsunashimanishi Kouhoku-ku, Yokohama 223-0053 Japanio

Mi esperas trovi iun korespondamikon en Svedio. Mi ne ŝatas alkoholon, tabakon, skandalon... Mi ŝatas librojn pri vojaĝoj. Mi ne estas juna rusa virino. Mia naskiĝtago estas 20 feb. 1943. Mi ŝatas naturon, arbaron, florojn. Antaŭe mi verkis versojn kaj mi ankaŭ ŝatas belan muzikon. S-ino Galina Starostina pr. Makeeva 28-4 g. Miass Celabinskaja obl. RU-456320 Rusio

La filo de Galina. Naskiĝis la 6-an de septembro 1973. Li estas meblolignisto kaj mem faras meblojn. Li nek ŝatas alkoholon nek fumadon kaj deziras trovi ĵustan korespondamikon. Vladimir Starostin pr Makeeva 28-4 g. Miass Celabinskaja obl. RU-456320 Rusio

Aktiv sommarkurs Somerkurso en Gunnilse

Den 20 septembro avslutade Aktiva Esperantoklubo sin sommarkurs for komencantoj. Efter tolv onsdagar var det dags att dela ut diplom och att avsluta med kaffe och tarta.

För att hedra kursdeltagarna hade Aktiva fått besök från en av Köpenhamnsklubbarna, nämligen Simon Petersen som även närvarade på SEF-kongressen 2000 i Helsingborg.

Samarbetet mellan danskar och skåningar fortsätter oförtrutet och med oförminskad styrka. Simon Petersen passade samtidigt på att bjuda in Aktivas medlemmar till klubbmöte i Köpenhamn. Det blev också bestämt att den framgångsrika sommarkursen genast kommer att åtföljas av en fortsättningskurs.

Medlemsutvecklingen för Aktivas vidkommande, har detta år varit positiv, även om flera av våra unga aktivister temporärt lämnat Helsingborg för Stockholm, Asien m.fl. orter.

Årsmötet och invigningen av vår nya klubbstuga Aktiva Aktivejo-2 har blivit uppskjuten till Zamenhofdagen den 15 december. Men då kommer det att hållas en riktig klubbfest. Aktivas aktivister har som bekant gjort sig kända för att veta hur man sätter fart på en fest, med bl.a. dans, musik o.dyl.

Ĉel Randehed

Dum kelkaj varmaj kaj belaj somertagoj 3-7 julio la Gotenburga Esperantoklubo aranĝis Esperanto-kurson en Gunnilse, nordoriente de la centro de Gotenburgo. La klubo luis lokalojn en la misifederacia kapelo de Gunnilse, kie oni povis havi du studrondojn, unu komenculan por plenkreskuloj kaj unu por infanoj. La plenkreskula grupo konsistis el kvin lernantoj kaj havis Ali Khoshmashraban kaj Andreas Nordström kiel gvidantojn. La infana grupo kolektis ses infanojn kaj estis gvidata de Siv Burell, Margareta Andersson kaj Helfrid Karlsson. La kurso ofertis diversajn aktivadojn.

Krom ordinaraĵ lecionoj okazis kantado kaj ludado (la plenkreskula grupo foje partoprenis) kaj montrado de du videofilmoj: Mazi en Gondolando kaj pupteatra filmo pri la vivo de Zamenhof. La infanoj ellaboris dum la semajno etan prezentadon, kiun ili prezentis en la lasta tago. Ili faris ankaŭ banekskurson al proksima lago. Entute agrabla kaj malstreĉita-kurssemajno en la somerbela kamparo.

Andreas Nordström
(El Inter-ligilo 2000:3)

Rondo Langlet

Ett avtal har träffats mellan SEF och JAK Medlemsbank, som ger Sveriges esperantister möjlighet att med regelbundna bidrag stödja SEF:s verksamhet i stödföreningen Rondo Langlet.

De nuvarande medlemsavgifterna räcker nätt och jämnt för att bestrida utgifterna för *La Espero* och *Esperanto-Centro*. För övriga utgifter är SEF helt beroende av gåvor.

Valdemar Langlet spelade en viktig roll i den tidiga esperanto-rörelsen i Sverige. Till hans minne har stödföreningen instiftats.

Den som anmäler sig som medlem i Rondo Langlet ger sin bank eller postgirot uppdrag att regelbundet sätta in en summa på SEF:s konto i JAK medlemsbank.

Blanketter för regelbundna överföringar från bank eller postgiro sänds till intresserade efter kontakt med SEF-kassören.

Börje Andersson
Ingeгатan 4 A
54100 Skövde
tel 0500 - 412205

UEA-avgiften för år 2001

Ett starkt UEA kan hävda sig bättre i en värld, som idag mer än någonsin behöver ett neutralt språk. Stöd därför UEA med ditt medlemskap. För din egen del betyder det, att du får UEA:s årsbok med namn och adress på delegater i hundratalet länder, och om du är MA-medlem, får du även tidningen *Esperanto*, som ger dig värdefull information om vad, som händer i esperantovärlden. Dessutom ger medlemskapet dig rätt till betydligt lägre kongressavgift.

Du betalar avgiften genom att sätta in pengarna på postgiro 14 74 29-5, SEF specialkonto. Ange på talongen vad pengarna avser.

Avgifterna för år 2001 är följande:

Kategori

MA	Direktmedlem med årsbok och tidningen <i>Esperanto</i> . Om man är under 30 år blir man automatiskt medlem även i TEJO och får <i>Kontakto</i> . Ange födelseår!	430 kr
MJ	Direktmedlem med årsbok. I övrigt se ovan!	170 kr
MG	Direktmedlem med "Gvidlibro". Ger inte nersatt kongressavgift.	70 kr
SZ	Avgift för "Societo Zamenhof", särskild stödorganisation. Ger inte medlemskap i UEA	860 kr
PT	"Patrono de TEJO", får tidningen <i>Kontakto</i>	510 kr
DM	"Dumviva membro" betalar för hela livet. Får tidningen <i>Esperanto</i> och årsboken.	10.750 kr
DPat	"Dumviva Patrono", betalar för hela livet. Får tidningen <i>Esperanto</i> och årsboken och blir därtill ständigt medlem i "Societo Zamenhof".	107.500 kr
DPT	"Dumviva Patrono de TEJO" betalar för hela livet och får tidningen <i>Kontakto</i> .	12.750 kr

Lisbet Andreasson
Södra Rörum pl 455
242 94 Hörby
tel. 0415-50152



KORESPONDU

La filo de Galina. Naskiĝis la 6-an de septembro 1973. Li estas meblolignisto kaj mem faras meblojn. Li nek ŝatas alkoholon nek fumadon kaj deziras trovi justan korespondamikon. Vladimir Starostin pr Makeeva 28-4 g. Miass Celabinskaja obl. RU-456320 Rusio

Esperantopartio de Britio

Esperanto-Partio de Britio estas nove fondita brita politika partio. Ĝi celas propagandi Esperanton en la politika areno, kaj intencas proponi kandidatojn por la elektoj al la Eŭropa Parlamento en la jaro 2004.

La ĉefa kaj plej videbla politiko de nia partio estos kompreneble Esperanto, sed ĝi ne estos la sola politiko. La partio devos havi respondojn al demandoj pri tuta gamo da temoj – sociaj, ekonomiaj, mediaj, kulturaj, ekonomiaj ktp. Se la kandidatoj de la organizo estos elektitaj ili bezonos gvidliniojn pri kiel voĉdoni en la sesioj de la Eŭropa Parlamento. Pro tio, eventuale, la Esperanto-Partio evoluigos plenan manifeston. Sed tio ĉi estos afero por venontaj jaroj (kaj venontaj partianoj). La ĉefa funkcio por la nuna estraro de la partio estas starigi la organizaĵon kaj efike ĝin administri, kun zorga atento al la leĝoj pri politika agado en Britio.

Kompreneble unu el niaj ĉefaj celoj estas simple fari publicon por Esperanto. Estas pro tio ke ni elektas la titolojn "The Esperanto Party" (angle) kaj "Plaid Esperanto" (kimre). Sur la balotiloj aperos la vorto "Esperanto" kaj la voĉdonantoj konstatos ke la afero Esperanto pluvivas.

La estraro de la partio estas: funkcia sekretario, Neil MacKilligin; funkcia kaskisto: Craig Bootz. Kontakto eblas:

Esperanto-Partio de Britio
46B Esplanade, Burnham On Sea, Somerset, Britio, GB-TA8 2AQ.
Rete: oficejo@e-p.org.uk

Malgranda fina venko – sen preparo

Hungario estas inter tiuj malmultaj landoj, kie la ŝtato oficiale rekonas la Internacian Lingvon. Pravas tion plu-

raj faktoroj, kiel apero de E-lingva klariga teksto en la telefonlibroj, fervojaj horaroj, ekzisto de aparta E-fako en la Budapeŝta Universitato ktp. ktp.

Pasintjare oni akceptis novan leĝon, kiu transformis la strukturon de la ŝtate rekonitaj lingvo-ekzamenoj. En la unua paŝo estis rekonitaj nur 7 fremdaj lingvoj, kaj nun, post plurmonata klopodo la 25-an de septembro oni akreditis ankaŭ Esperanton!

Tio signifas, ke ekde post 2-3 semajnoj oni denove povos plenumi ŝtate rekonitajn lingvoekzamenojn ankaŭ pri la Internacia Lingvo. Ĝia sekvo estas, ke oni denove rajtos fari abituriantan ekzamenon el Esperanto, oni konsideras la lingvoekzamenon (mezan aŭ supernivelan) kiel krompoentoj ĉe la priakcepta ekzameno al universitatoj, ĝi estos utiligebla ankaŭ kiel kondiĉo por ricevo de altlernejaj diplomoj, kaj oni eĉ rajtos ricevi kromsalajrojn en koncernaj laborejoj.

Plej grava estas la supra "diplomkondiĉo", ja ekde 3 jaroj studentoj en altlernejoj kaj universitatoj rajtas ricevi sian diplomon, nur se ili havas 1 aŭ 2 ŝtate rekonitajn lingvo-ekzameno(j)n. Tiu kondiĉo instigis multcentojn de studentoj eklerni Esperanton, kaj la nuna akreditado remalfermas la pluan pozitivan vojon al pli vastskala E-instruado.

Oni ja povus taksu tiun eventon kiel "malgranda fina venko". Bedaŭrinde la realaj okazaĵoj tre bone montras la netaŭgan funkciadon de la nuna E-movado, ja la hungariaj Esperanto-organizaĵoj tute ne estis preparitaj al tiu "venko".

En la pasinta kaj en la antaŭpasinta jaroj la tutan aŭtunon sonoris la telefono en la Budapeŝta E-Domo (sidejo de Kultura E-Asocio "Eventoj") kaj oni petis startigi E-kursojn, peri instruistojn, disponigi vortarojn, lernmaterialojn el plej diversaj anguloj de la lando ...

Laszlo Szilvasi
prez. de Kultura E-Asocio ĉe Eventoj
(El ret-info)

Asocio de Junaj Esperantistoj nepre estu!

La 15an de aprilo junaj esperantistoj de Estonio aranĝis en Tallinn Esperanto-vesperon kune kun la Junulara Societo de Naturprotektado (ne-esperantistoj).

La partoprenantoj de la E-vespero

kolektiĝis en Tallinn, sur Rävåla str.8. Post la raporto de la esperanto-agado de la estrarano de Esperanto-Asocio de Estonio (EAE) Roman Ŝvecov kaj la respondoj al la aperintaj demandoj la kolektantoj diskutis la rolon de junularo en la E-movado.

Oni akceptis la decidon krei la Asocion de Junaj Esperantistoj de Estonio (AJEE), kies celo estas kontribuo al kontentigo de spiritaj kaj kreivaj postuloj de nia junularo.

La partoprenantoj de la vespero diskutis ankaŭ la statuton kaj perspektivojn de estonta agado de AJEE. Ĉiuj dezirantoj fariĝi membroj de AJEE povis tuj fari tion. Prezidanto de AJEE estis elektita Roman Ŝvecov.

La diskuto daŭris en la saŭno, kie ĉiuj bone ĝuis la vaporon kaj naĝis en la baseno.

La vespero pasis en amikeca etoco kaj tio spite al la fakto, ke antaŭe ne niu konis unu al alian!

Ni kredas, ke AJEE vere kontribuos al la plifermigo de rilatoj kaj amikecaj kontaktoj inter la popoloj parolantaj en diversaj lingvoj, la homoj de diversaj kulturoj kaj religioj.

Roman Ŝvecov
Prezidanto de AJEE
roman@cc.ttu.ee

Solförmörkelse i Madagaskar

Madagaskars esperanto-organisationsger ut en liten tidning som heter *Inter ni*. Där finns tips till den exklusiva resenären, dvs den som kan tänka sig att resa till Madagaskar (vem skulle inte kunna tänka sig att göra det?).

Nästa sommar har man chansen att uppleva en solförmörkelse på södra delen av ön den 21 juni och då planerar esperantisterna en träff där. 2002, i augusti, är det dags för deras andra nationella kongress.

Anita Dagmarsdotter

El Popola Ĉinio ĉesos aperi

La revuo *El Popola Ĉinio* ĉesos aperi en presita eldono je la fino de ĉi tiu jaro. Ek de 2001 ĝi estos havebla nur rete kaj senpage. La redakcio informas, ke tiuj, kiuj antaŭpagis por la revuo, povos ricevi por la restanta sumo librojn eldonitajn de Ĉina Esperanto-Eldonejo.

(El NUN)

2001: Eŭropa jaro de lingvoj

KORESPONDU

Unue mi volas prezenti min. Mi estas 17-jara japana knabino. Mia nomo estas Ai Katou, Katou estas la familia nomo kaj Ai estas la persona nomo. Mi naskiĝis en la 11-a marto 1983 en Yokohama. Ai Katou 1-12-9 Tsunashimaniishi Kouhoku-ku, Yokohama 223-0053 Japanio

Mi esperas trovi iun korespondeamikon en Svedio. Mi ne ŝatas alkoholon, tabakon, skandalon... Mi ŝatas librojn pri vojaĝoj. Mi ne estas juna rusa virino. Mia naskiĝtago estas 20 feb. 1943. Mi ŝatas naturon, arbaron, florojn. Antaŭe mi verkis versojn kaj mi ankaŭ ŝatas belan muzikon. S-ino Galina Starostina pr. Makeeva 28-4 g. Miass Celabinskaja obl. RU-456320 Rusio

Konsilio de Eŭropo, en kiu membras preskaŭ ĉiuj landoj de Eŭropo kaj kiu estas konata pro sia okupiĝo pri homaj rajtoj, kaj Eŭropa Unio deklaris la jaron 2001 Eŭropa Jaro de Lingvoj.

La du eŭropaj organizaĵoj strebas progresigi instruadon de lingvoj kaj levi la konscion de la granda publiko pri la valoro de lingva plureco en Eŭropo. Krom vasta informkampanjo, uzanta specialajn simbolojn kaj frapfrazojn, oni organizos amason da eventoj sur ĉiuj niveloj: tuteŭrope, plurlande, nacie kaj loke.

UEA subtenas la iniciaton de la eŭropaj organizaĵoj. La celoj de la Eŭropa Jaro de Lingvoj kongruas kun tiuj de la Esperanto-movado, al kiu ĝi donos okazon diskonigi siajn lingvopolitikajn celojn. Eĉ se la Jaro formale celas nur la lingvojn "rekonitajn de la membroŝtatoj" ĝi ja ebligas partoprenon ankaŭ de Esperanto-organizaĵoj per projektoj kongruaj al la celoj de la Jaro. Krome oni povas antaŭvidi, ke ĵurnalistoj k.a. interesitoj ne limigos sin nur al la ŝtataj lingvoj sed povos interesiĝi ankaŭ pri la situacio de Esperanto kaj la perspektivoj por ĝia pli vasta uzo en Eŭropo.

La Jaro de Lingvoj prezentas ŝancon al agado por antaŭenigi la celojn de Kampanjo 2000, t.e. plialtigi la prestiĝon de la internacia lingvo, influi la internacian vivon, kaj levi la organizan kaj idean nivelon de la Espe-

ranto-movado. La Jaro ricevos atenton i.a. en la traktado de la kongresa temo de la Zagreba UK, "Kulturo de dialogo – Dialogo inter kulturoj" kaj en la eldona agado de UEA, t.e. revuoj kaj libroj. Landaj asocioj devus atenti ĝin en siaj aranĝoj kaj eldonaĵoj, kaj klopodi kiel eble plej multe kunlabori kun ne-esperantistaj asocioj kaj fakuloj.

Por evoluigi ideojn pri la esperantista kontribuo al la Jaro, estas formiĝanta kunaganta grupo kiun kunordigas Anna Ritamäki:

Anna Ritamäki

Dragsfjärdsvägen 690
FI-25700 Kimito
Finnlando
rete: anna.ritamaki@kolumbus.fi
tel. 00-358-2-423146
fakso 00-358-2-423246

Oficialaj informoj troviĝas en TTT i.a. ĉe:

<http://europa.eu.int/comm/education/languages/actions/year2001.html>
anglalingva kunligo al alipaĝaj versioj)

<http://culture.coe.fr/infocentre/press/eng/2000/epress2000.04.03.html>

(gazetara komuniko de Konsilio de Eŭropo)

UEA 17/7 2000

LASTMOMENTE

Tragika forpaso

Tragike forpasis la 28-an de novembro **Birger Viggen**, unu el la vere aktivaj membroj de la sveda esperantomovado.

En la stokholma metroo li piedpaŝis erare kaj falis sur trakojn, kie li estis surveturita de alvenanta trajno.

Li estis dum nur du semajnoj prezidanto en la estraro de Esperanto-Gården, funkcio, kiun li plenumis jam antaŭe kiel anstataŭanta prezidanto. Nur tagon pli frue li estis liverinta la programfolion por la Lucia-festado de la stokholmaj esperantistoj, kiu li planis gvidi. Du semajnojn pli frue li es-

tis en Lesjöfors en la seminario de Sveda Esperanto-Instituto, en kies aranĝado li ludis tre gravan rolon.

Tia estis la esperanto-vivo de Birger Viggen la tutan tempon: malgrandaj kaj grandaj taskoj sur loka, nacia kaj internacia niveloj. Li estis dum multaj jaroj estrarano de SEF, li membris en LKK por la Universala Kongreso 1980 en Stokholmo. Li havis diversaj funkcioj en sveda KELI kaj en LIBE, Ligo de Blindaj Esperantistoj.

Li komencis sian esperantistan vivon en la blindula presejo de Harald Tillander, pri kies pionira laboro li vo-

Mondfama fantasta romano

Aelita en esperanto

Aperis nova libro: A.N. Tolstoj Aelita aŭ Marso formortanta. Fantasta romano. Elrusiĝis E.Pill. Dua esperantlingva eldono. – Akileo, Niĵnij Novgorod (Rusio), 2000. 143 paĝoj. 7,50 eŭroj.

En Rusio la plej prestiĝa literatura premio por verkistoj-fantastistoj nomiĝas Aelita. La mondfame konata klasika fantasta romano rakontas pri flugo al Marso, pri amo de la terano kaj la marsanino. La libro komenciĝas per antaŭparoleto, kiun Aleksej Tolstoj speciale skribis por esperantlingva eldono.

(EI NUN)

Esperantaj libroj ĉe Libro-Foiro en Frankfurt

Esperantaj libroj estis prezentataj ĉe Internacia Libro-Foiro en Frankfurt (Germanio) en la budo de pola Eldonejo KLEKS en la pola halo. La eldono prezentis inter la aliaj la luksan Nigran Serion kun *Marta* de E.Orzeszko; *Higieno de l' murdisto* de Amelie Notomb kaj kompaktdiskon kun originalaj esperantaj baladoj de Georgo Handzlik *Ni tostu la verdan esperon*.

En la Nigra Serio ĵus aperis *La lada tambureto* de Günter Grass, Nobel-premiito de 1999. En la budo oni ankaŭ informis pri Esperanto.

(EI NUN)

lonte rakontis. Li estis oftega vizitanto de internaciaj kongresoj, kaj la ĝeneralaj kaj la specialaj de LIBE, kaj neniam permesis, ke lia handikapo malobliĝu al li fari ion, kion li volis.

Mi memoras viziton, kiun ni foje faris al Turku. En la katedralo li petis de la orgenisto-esperantisto, kiu gvidis nian viziton, permeson mem ekludi. Kaj laŭte aŭdiĝis lia ludado sur la orgenego tra la katedralo.

Tiel mi ŝatas memori Birger: sentima, iniciatema, nelacigebla, ĉiam inspiriga.

Franko Luin

EU:s språkproblem har en lösning

Håkan Lundberg har bidragit med en utmärkt replik i EU-språkdebatten i Dagens Nyheter (s. A 11 den 4/10 2000), som ett svar på ett inlägg av Sten Heckscher. I La Espero publicerar vi artikeln i oavkortat skick.

Strålande! - var min första tanke när jag såg Heckschers artikel om EU:s språkproblem. Hans idé, "att radikalt minska antalet språk och dessutom komma överens om att ingen får tala sitt eget", är i sig mycket intressant. Men framförallt är det viktigt att frågeställningen om språk i EU tas upp till diskussion! Och som Heckscher skriver "... inte minst för att underlätta EU:s angelägna utvidgning måste något göras åt språkreglerna" så börjar det bli dags att se över vilka alternativ som finns för att minska överläggningskostnaderna och som samtidigt behåller den språkliga rättvisan då fler och fler länder knackar på EU-dörren.

Heckscher avslutar med att fråga "... kan någon komma på en bättre idé som förhindrar katastrofen och vidmakthåller likställheten?". Svaret på den frågan är för mig ett givet "JA!" Det finns en bättre idé, nämligen esperanto, som är mer kostnadseffektiv (inga tolkar behövs på lång sikt) och som borde vara lättare att få accepterad av EU:s alla länder än att välja ut

fyra av de idag befintliga EU-språken. Esperanto används redan under en mängd internationella möten med stor framgång världen över. Ett exempel är när TEJO - Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (världsförbundet för unga esperantister) har sina träffar. I år låg årsmötet i Hongkong och hade representanter från länder som t ex Italien, Tyskland, Kina, Holland, Korea, Frankrike, Japan och Sverige. Inga tolkar behövs, ingen kände sig språkligt underlägsen och de språkliga missförstånden var få om ens befintliga. Hür var nu detta möjligt? Jo, tack vare att vi alla gick halva vägen var med hjälp av det neutrala och internationella språket esperanto, och möttes i en atmosfär av respekt och förståelse för de olika ländernas språk och kulturer.

Skulle inte engelskan eller något annat nationellt språk kunna fungera på ett motsvarande sätt? Jo säkert, men det finns tre stora nackdelar med en sådan lösning för EU: 1) det är svårt att få alla länder att enas om ett eller ett fåtal språk 2) de representan-

ter som har det valda språket som modersmål har stora fördelar jämfört med övriga länders representanter 3) det tar lång tid att lära sig ett nationellt språk till en nivå där man kan uttrycka sig obehindrat. Heckschers förslag löser endast den andra punkten medan esperanto tacklar alla dessa problem: 1) Genom att esperanto inte tillhör något speciellt land eller region borde det vara lättare för EU-länderna att acceptera det som gemensamt språk vid internationella träffar. 2) I och med att esperanto är lika lätt att lära sig oberoende av modersmål har ingen nation övertag eller stora fördelar vid användandet av esperanto. 3) På grund av språkstrukturen, grammatiken och orduppbyggnaden i esperanto är det betydligt lättare att lära sig detta fullvärdiga språk än de nationella språken som alla har mer eller mindre krånglig grammatik och ologisk stavning/uttal. Vissa kanske invänder att "det inte går att uttrycka känslor på esperanto", "ett språk utan kultur är inget riktigt språk", "det finns ingen ori-

PRETERE

La mistero pri la nomo de la entrepreno Eniro AB (vidu p. 8) ne plu estas mistero.

SEF ricevis de iu entrepreno, kiu eltrovas novajn, registreblajn nomojn por produktoj kaj entreprenoj (20 dungitoj) - inter ili unu membro de SEF) mendon de pluraj vortaroj de Ebbe Vilborg. La mendinto, kun kiu Roland Lindblom havis kontakton, sciigis, ke li mem proponis Eniro kiel nomon.

Posta la havigo de tiuj vortaroj oni eble povas atendi pli da produktoj kaj entreprenoj kun esperanto-nomoj.

UK i Zagreb 21-28 juli 2001

Anmälningavgifter (svenska kronor)

	-31/12	-31/3-01	1/4-
1. Icke direkt medlem i UEA	1290	1610	1935
2. Direkt medlem i UEA (ej MG)	1035	1290	1550
3. Medföljande, handikappad eller ungdom (född mellan 71-01-01 och 80-12-31), som inte är medlem i UEA	775	965	1160
4. Medföljande, handikappad eller ungdom, som är medlem i UEA	515	645	775

Handikappassistenter och ungdomar födda efter 80-12-31 betalar ingen kongressavgift. I händelse av kursändring kan kongressavgiften komma att justeras.

Anmälningssblankett för kongressen kan beställas hos:

Lisbet Andreasson
Södra Rörum pl 455
242 94 Hörby
tel 0415-50152

Blanketten skickas tillbaka till samma adress. All betalning sker till postgiro 14 74 29-5, Svenska Esperanto-Förbundet, Specialkonto. 0415-50152

DONACOJ

MEMORE AL ANNA
JOONAS
Gertrud kaj Torsten
Lund, Malmö
200 kr

RONDO LANGLET
Wim Posthuma,
Västerås 200 kr

FONDUSO DE M.
ANDREASSON
Gertrud kaj Torsten
Lund, Malmö
200 kr
Esperanto-Gården
1000 kr

MEMORE AL REGI-
NA EMSON
Gulli Svensson,
Malmö 100 kr

KLUBO MIL
Ulla Luin, Tyresö
1000 kr

CETERE (Kontribuo
al EC lukosto)
Ulla Luin, Tyresö
1000 kr

SEF dankas pro la
donacoj
Pliaj estas bonvenaj
al poŝtĝirkonto de
SEF 2012-3

ginalliteratur på esperanto" osv. För den som haft ett förhållande där esperanto varit det gemensamma språket, har deltagit på livliga esperantokulturfestivaler och har mött sin favoritförfattare genom esperanto är dessa påstående otroligt märkliga!

Svaret på Heckschers fråga är alltså: Ja någon kan komma på en bättre idé som förhindrar katastrofen och vidmakthåller likställigheten! Idén bygger på esperanto och är bättre eftersom den är mer kostnadseffektiv och har större chanser att bli accepterad om EU kan bortse från sina eventuella fördomar och verkligen undersöka denna idé på ett objektivt sätt för att på så sätt ge esperanto en rättvis chans. Är detta för mycket begärt av en organisation som EU? Det återstår att se...

Förhoppningsvis kan vi i all fall under det kommande året, som är utropat till "Europeiska året för språk" av EU och Europarådet, få en intressant diskussion om språkproblemet i EU. Så låt oss fortsätta den debatt som Heckscher har, genom sitt inlägg i DN, inlett på ett strålande sätt!

Håkan Lundberg
aktiv i TEJO

Sennuance pri Raŭmo

En *La Espero* numero 4/2000 estis artikolo kun la rubriko "20-jara jubileo de la Raŭma Manifesto" [p. 11]. Estis represita teksto el gazeto *Eventoj*, verkita de ĝia redaktoro Laszlo Szilvasi. Unue la teksto serioze informas, sed precipe en la du lastaj alineoj la priskribo/pritakso fariĝas sennuanca, iu misprezento.

Mi mem plenesperantistiĝis tro malfrue por alkutimiĝi kun la vorto raŭmismo, sed per multjara studo de la gazeto *Literatura Foiro* mi tamen havas bonan koncepton pri la nocio.

Laŭ mi raŭmanoj ne izolas sin de cetera esperantistaro, kaj ne indiferentas antaŭ disvastigo de esperanto. Tion oni facile povas konstati per studo de *Literatura Foiro* aŭ *Heroldo*.

La raŭmanoj povas kvalite evoluiĝi esperanton kaj tio, laŭ mi estas grandega tasko (kaj mi ekzemple allogiĝas de la Praga Manifesto pro ĝia ignoro de la signifo de originala esperanta beletro).

Mi ne dubas pri iu futura finvenko de esperanto, sed mi kredas, ke raŭmismo multe kontribuas al estonta mondtiumfo de nia lingvo.

Jarlo Martelmonto

Ree pri kune kaj ne kune

Franko Luin skribas, ke li ne komprenas, kion la vorto kune signifas al mi. [*La Espero* 2000:4 p.2]. Nu, en tiu kazo ni estas du, kiuj ne komprenas, ĉar mi ne komprenas la pensojn de Franko. Al mi ŝajnas, ke Franko provas samtempe pledi por du malaj starpunktoj.

Li volas, ke estu nur unu esperanta organizo en Svedio. Citaĵo: "... mi ne vidas pravigon por pli ol unu organizo, kadre de kiu laboru memstare diversaj grupoj kaj sekcioj." Kiel ekzemplojn li mencias eldonejojn kaj apartan "organizan strukturon" por gvidi Esperanto-Gården. Laŭ la svedlingva versio: "... samlar alla esperantister i en organisation. Inom denna organisation kan vi sedan ha avdelningar, grupper eller sektioner, t.o.m. företag ... driva ... Esperanto-Gården ... ge ut böcker och musik."

Krome li ne kredas necesa novan kupolan organizon. Ŝajnas do, ke la nunnura organizo devas esti SEF.

Aliflanke li asertas, ke ne ĉiu aktivado por esperanto okazu en unu sola organizo.

Laŭ mi tio estas du inter si ekskludaj asertoj. Aŭ Esperanto-Gården kaj Eldona Societo Esperanto estas partoj de alia organizo, aŭ ili ne estas.

Kaj se ili ne estas, ili estas suverenaĵoj kaj memstaraj esperanto-organizoj kun propraj ekonomio, estraro, membraro ktp. Kaj laŭ mia opinio estas tre grave, ke ili restos tiaj. Se unu falos, ne ĉiuj falu. Se unu estos malsaĝe estrata, ne ĉiuj estu. Se unu dependas de membrokotoj, alia povas klopodi per profitodona agado fortigi esperanton.

Nu, fakte apenaŭ ekzistas risko, ke tiuj du kooperativoj perdu sian mem-

starecon, ĉar kiel ekonomiaj kooperativoj povus fariĝi partoj de idealisma federacio, kiu estas unuigo de lokaj kluboj? Verŝajne nur se la federacio aĉetos ilin aŭ se ili likvidos sin mem kaj fordonacos siajn havaĵojn.

Restas do la alia ebleco de interpreto: ke ni simple nur pretendu, ke Eldona Societo kaj Esperanto-Gården estas partoj de SEF. Sed kiajn motivojn ni povus havi por tio? Disvastigi la falsan ideon aŭ koncepton, ke ili ne estante partoj de la federacio tamen estas partoj de la federacio, povas konduki nur al malagrablajoj kaj manko de kredindeco ĉe la publiko.

Fakte, troviĝas eĉ tria ebleco, nome ke la estraranoj de Eldona Societo kaj Esperanto-Gården funkcii ne kiel elektitoj de la koncernataj jarkunveno, sed kiel pseŭdoreprezentantoj de SEF. Ke iasence SEF havu ne laŭstatutan, sed faktan, "gvidan rolon" super ĉiuj esperanto-organizoj en Svedio. Ja ankŭ tio estas, mi vere esperas tion, absurda interpreto de la vortoj de Franko, sed ĉu troviĝas iu malabsurda? Franko, ilumini nin!

Ĉu ne estus pli bone, ke la organizoj kunlaboru kaj ĉe bezono prezentu riĉan repertuaron de organizoj kaj eventoj sub unu rubriko, ekzemple Esperanto en Svedio?

Bertil Nilsson

Unufraza respondo

Mi ne komprenas, kial nun, t.e. en la jaro 2000 kaj venontaj, ekzistu apartaj religiaj, laboristaj aŭ alia-istaj esperanto-organizoj, kiuj laboru por la **ideo** de esperanto en **Svedio**, sed ja ke ekzistu diversaj specialaj entreprenoj, kiuj plenumas tute konkretajn taskojn apud la 'ideo'-organizoj.

Franko Luin

Dankon

Ni sincere dankas ĉiujn geamikojn, kiuj diversmaniere montris sian kunsenton, kiam mortis nia Märtha Andreasson.

Elkore

Inge, Ing-Marie, Ingelis, Marianne kaj Johnny

Fonduso de Märtha Andreasson por SEJU

La SEF-estraro dum kunsido pritraktis la regulojn por la nova fonduso memore de Märtha Andreasson.

La estraro decidis, kun aprobo de du ĉeestantaj reprezentantoj de SEJU, ke la mono de la fonduso estos iom post iom transdonita al SEJU kaj uzota laŭ decido de la SEJU-estraro por stipendioj aŭ aliaj celoj.

Ĝis nun alvenis kontribuoj de la sekvaj al la fonduso:
SEF; Dag Ellard, Ljungby; Gunilla Sundholm, Västerås; Akiko kaj Keiko Snarberg, Jönköping; Gertrud kaj Torsten Lund, Malmö; Esperanto-Gården

Trans maro kaj morto

DONACOJ AL SEJU

La sekvaj donacis monon al SEJU okaze de la forpaso de Märtha Andréasson: Siv och Bertil Börjesson, Kathe Erdegard, Gun Ståhl, Leif Sällström och Uno Sällström, Andreas Nordström, Jan-Olof & Kerstin Karlsson, Esperanto-alianco de Gotenburgo, Esperanto-societo de Gotenburgo, John Nilsson, Brita H., Britta S., Helmer, Huskvarna Esperantoklubb, Dolly Carlsson, Elin, Gunilla och Larry. Jan och Kristina, IngaBritt, Gillis Karlsson och Monica, Astrid och Karl-Erik Leinstedt, Aina Abrahamsson, Anita och Leif Ahlqvist, Kerstin Inger Nilsson, Margareta Andersson, Evert och Inga Olsson, Bengt Andersson, Aira Kankkunen, Gunnar Börjesson, Lilian Andersson, Kerstin och Lennart Jansson, Holger Andersson med familj, Aina och Folke Johansson, Ulla Andersson med familj, Morgan, Ingalill, Maud, Lars Andersson, Majken Svensson med familj, Västana-barn med familjer,

Se vi legis la unuan krimromanon de Sten Johansson *Falĉita kiel fojno* vi certe ankaŭ volas legi la duan kiu aperis pasintjare. Ĝi estas mallonga rakonto kun streĉa intrigo kiun mi rapide voris por ekscii la solvon. Tamen la personoj kaj okazaĵoj pli longe restas en miaj pensoj. Por verki ĉi tiun recenzon mi tralegis ĝin duan fojon kaj tio vere indas. En la relegado la galerio de personecoj aperas pli klare.

La scenejo de la rakonto moviĝis de Smolando al Oelando, kaj sur tiu idilia insulo okazas la plej tragikajn eventojn. Samtempe la verkisto traktas plurajn problemojn de la nuna sveda socio kiel rifuĝintoj, ksenofobio, opozicio kontraŭ virinaj pastroj, dependeco de hazardludado. Liaj stilo kaj temoj gvidas miajn pensojn al tre sukcesa sveda verkisto de krimromanoj. Mi dirus ke Sten Johansson estas Henning Mankell de Esperanto.

La kadro de la okazaĵoj estas grupo de iranaj rifuĝantoj kiuj kaŝiĝas en preĝejo en Oelando kun helpo de la pastrino. Ŝi evidente pruntis trajtojn de la pridiskutata pastrino Ma Oftedal. Nur legu ekzemplojn de ŝiaj programoj en la preĝejo listigitaj de unu el ŝiaj kontraŭuloj:

...*transcendan meditado. Psikedramon. Ŝamanan tamburseancon. Sorĉistin vuduon. Kaj nun - tiel nomatajn rifuĝantojn, kiuj sendube preĝas al Alaho antaŭ la altaro.*

La supra kontaŭlo de la pastrino estas la busoforo John Blidh, gvidanto de la blu-flava movado. Mi suspektas ke ankaŭ tiu persono havas modelon, ĉi foje sveda esperantisto kun similaj bedaŭrindaj opinioj kiel la romanfiguro.

Tiaj portretoj, same kiel multaj aliaj en la libro, estas lerte faritaj. Nur per kelkaj vortoj li kaptas la personecojn ankaŭ de flankaj roloj. Mi precipe ĝuis la humurajn portretetojn de bienulo kaj maljuna fiŝkaptisto.

La romano estas mallonga kaj bedaŭrinde oni ne havas tempon pli bone ekkoni la du policistojn Svedberg kaj Jankéus. Ilia tasko estas gvidi la rakonton antaŭen per siaj serĉo de informo kaj esploro de la reto de rilatoj inter la homoj sur la insulo. Kaj kiel bona krimverkisto Johansson jetas min de unu teorio al alia: certe estas li, ne ŝi, aŭ eble ili du? Tre amuze estas kiam unu el la policistoj mem cerbumas pri la diferenco inter realeco kaj krimromanoj:

Laŭ lia sperto, en veraj murdenke-

toj la plej kutima kazo estas, ke troviĝas neniu suspektito, neniu havas motivon, kaj ŝajne neniu estis en la murdloko je la koncerna horo. En la krimromanoj la malo normalas: deko da personoj, kutime pintoj de la socio, ĉiuj havas motivon, ĉiuj kondukas tre suspektinde, kaj ĉiuj pro diversaj kialoj kunpuŝiĝas en la loko de krimo, tiel ke la murdisto ŝajne devas plenumi sian sangan aferon meze de homamaso.

Mi ĝojas ke la sveda esperantomovado havas tian talentan verkiston, kaj la politiko de lia eldonejo Alfabeto estas laŭ mi laŭdinda: rapidaj kaj malmultekostaj eldonoj. Nun ankaŭ facile atingeblaj en la reto ĉe www.angelfire.com/co/alfabeto/

Kajsa Larsson

E-lernolibro por gimnazioj

Ja eblas studi Esperanton ĉe kelkaj svedaj gimnazioj, kaj aliaj gimnazioj eble sekvos. Specifa lernilo estas bezonata por tiu grupo de lernantoj: moderna lernolibro kun profesia aspekto, eroj de junulara kulturo kaj kun interaktivaj ekzercoj sur komputila kompaktdisko. De kelka tempo Lars Forsman, Christer Lörnemark, Kjell Randedhed kaj Folke Wedlin verkas tian lernolibron. "Esperanto por gimnazianoj" estas ĝia provizora titolo.

Christer Lörnemark

50 sanger på esperanto

Bokförlaget Al-fab-et-o i Skövde som ger ut böcker på esperanto har just släppt en samling med 50 sanger, *Kvinpinta kantaró 2000*, varav ca en tredjedel är original på esperanto, andra översättningar från olika språk. Fem sanger är översatta från svenska. Boken innehåller både text och noter med gitarrackord. Al-fab-et-o har mera information på sin nätsida <http://www.angelfire.com/co/alfabeto/>.

Franko Luin
(El Esperantonjtt)

IJK 2001 en Strasburgo, Francio

La Internacia Junulara Kongreso de TEJO okazos de la 29a de julio ĝis la 5a de aŭgusto 2001 en Strasburgo, Francio. Temo de la renkonto: "Plurlingvismo en Eŭropo: kiel ĝin sukcesiĝi?"

Programo: arta kaj lingva festivalo, prelegoj kaj diskutoj pri multlingveco, malkovrado de diversaj lingvoj, ekskursoj, koncertoj, ludoj kaj kutimaj distraĵoj: Akva pafado, Bamba ktp. Ankaŭ vi povos partopreni en la programo!

Por pliaj informoj kaj por aliĝi dum la unua tarifa periodo (ĝis la 3a de januaro 2001), vizitu la tt-ejon:

<http://purl.org/net/ijk2001>
Retadreso: JEFO@Esperanto.org

Esperanta simfonio de usona komponisto

David Gaines: unua prezento 06.10.2000 Filharmonia Halo (Horní Namesti), Olomouc, Ĉeĥio

- Moravia Filharmonia Orkestro (Moravská Filharmonie Olomouc)
- Vit Micka, dirigento
- Kimball Wheeler, mezsopranulino
- Vladislav Kvapil, violonisto

Programo

- Howard Richards (Usono) Fantazio por violono kaj orkestro
- David Gaines (Usono) Simfonio N-ro 1 por mezsopranulino kaj orkestro (1994-98)*
- Jan Vicar (Ĉeĥio) (nova verko)
- Antonín Dvorak (Ĉeĥio) Bibliaj Kantoj, Op. 99 (1895)

* La unua prezento iam ajn de simfonio por orkestro kun tekstoj en Esperanto

David Gaines ĉeestis la koncerton kaj estis en Olomouc dum la antaŭa semajno por la registrado de la simfonio por k-diska eldono en 2001.

DaveGaines@aol.com
(El ret-info)

AJN III

Sven och Ulla Lundström med familjer, Marianne och Lars Svensson, Ebbe Vilborg, Anne-Britt Attsjö, Tolsreds 4H-gård och Göteborgs 4H, Docent Bo Sandelin, Astrid och Tage Lindblom, Sivo Andersson, Helfrid Karlsson, Anneli Andreasson med familj, Sigrid Jangälv, Lilian Ingemarsson, Ulla Luin, Rolf Karlsson, Barbro Karlsson, Kerstin Kristoferson, Kjell och Lissi Persson.

La mono, sume 11 450 kr, estos uzata inter alie por helpi al esperantistaj gejunuloj vojaĝi en Esperantujo.

Inter **17-24. 02. 2001** okazos la 3-a Aranĝo Junulara Nordia en **Trondheim**, Norvegio. La renkontiĝo okazos en bela kabano meze de fabela arbaro – oni garantias neĝon! Dum AJN oni emfazas esperanton kaj skiadon, ĉi foje ankaŭ ĉokolado ludos gravan rolon. Multaj junuloj kaj bonega etoso akompanos dum la aranĝo ĉiun partoprenanton. Ne indas resti hejme. Pliaj informoj kaj aliĝo ĉe:

AJN
p/a Espen Nystad
Herman Krag's vei 31-43
NO-7050 Trondheim
Norvegio

Rete: ajn@esperanto.no

KAEST 2000

Ĉeĥa Esperanto-Asocio kore invitas vin al Kolokvo, aplikoj de Esperanto en scienco kaj tekniko okazonta en **Prago 10/11 - 12/11 2000** sub aŭspicio de UEA.

Priraktotaj temoj

- Sekcio A Ekonomio sojle al la tria jarmilo
- Sekcio B Terminologiaj problemoj de fakaj aplikoj de Esperanto
- Sekcio C Aplikoj de Esperanto en scienco kaj tekniko (ĝenerale)

Kolokvejo

Teknika universitato Prago, konvene lokita en la urbocentro (adreso: Karlovo náměstí 13, Praha 1).

Kotizo

Ĝis 30/9 2000 **36 eŭroj**
Pli poste **40 eŭroj**

Tranoktebloj

Popersono kaj ponokte.

Hotelo Union, 15 min piede aŭ tri tramstaciojn de la kolokvejo. Unulita ĉambro 49 eŭroj, dulita 33 eŭroj. Inkluzive matenmanĝon.

Hotelo Liben, dudek min per tramo de la kolokvejo. Lavpelo en la ĉambro, sed duŝejo kaj necesejo nur suretaĝe. Unulita ĉambro 13 eŭroj, dulita 10 eŭroj, trilita 9 eŭroj. Matenmanĝo 1,70 eŭroj.

Antaŭkolokva seminario

Antaŭ la kolokvo okazos en Dobrichovice (20 km de Prago) 8/11 - 10/11 2000 sub aŭspicio de IFEF terminologia seminario: (Ne nur) fervoja transporto kaj trafiko. Kotizo ĝis 30/9 2000 24 eŭroj, pli poste 26 eŭroj. Pensiono Sokol, unulita ĉambro 15 eŭroj, dulita 10 eŭroj, kompleta pensio 14 eŭroj.

Kava-pech Dorichovice

Anglická 878
CZ 25229 Dobrichovice
Ĉeĥio

Tel. 00-42-2-9912201
Fakso 00-42-2-9912126
Rete kaest@kava-pech.cz
<http://kava-pech.cz/kaest>

53-a IFEF-kongreso

La IFEF-kongreso okazos en **Tábor** en Ĉeĥio **inter la 12-a kaj 19-a de majo 2001**. Ĉeĥaj esperantistoj-fervojistoj kore invitas vin por kongresumi en historia urbo Tábor situanta en bela pejzaĝo de suda Bohemio. En la ĉirkaŭaĵo troviĝas multaj historiaj memorajoj, ankaŭ koncerne fervojon: la unua ĉevalfervojo en la eŭropa kontinento ja kunigis la sudbohemia urban Ceské Budejovice kun la aŭstria Linz kaj la unua elktrizita fervojlinio en Ĉeĥio estis tiu inter Tábor kaj Bechyne. Kiu venos, certe ĝuos ne nur la tradicie riĉan programon, sed ankaŭ belecon de nia lando kaj riĉecon de ĝia kulturo.

Kongreskotizoj (eŭroj)

Nemembroj de IFEF ĝis 31/12 60 ĝis 28/2 70 poste 80
Membroj de IFEF ĝis 31/12 50 ĝis 28/2 60 poste 70
Familianoj, junuloj, simpatiantoj ĝis 31/12 25 ĝis 28/2 30 poste 35

Loĝebloj

En pensiono aŭ hotelo inter 8 kaj 38 eŭroj ponokte.

LKK de IFEF-kongreso

Anglická 878
CZ-252 29 Dobrichovice
tel. 00-42-2-9912201
fakso 00-42-2-9912126

retpoŝte: ifef-kongreso@kava-pech.cz
hejmpaĝo <http://www.kava-pech.cz/IFEF-kongreso>

Ago-tago en Kievo

De la sabata tagmezo grupeto da aktivuloj el KJS (Kieva Junulara Societo) kaj lernantoj de liceo N38, komencis la Ago-tagon sur ĉefa placo de Ukrainio – Placo de Sendependeco kaj sur ĉefstrato de Kijivo Kreščatik. Venis ankaŭ kelkaj "malnovaj gvardianoj".

En la manoj de la gejunuloj estis flugfolioj "Kio estas Esperanto?", vizitkartetoj de KJS kaj folioj kun demandoj por la sociologia esploro. Kun tiuj materialoj ni "kroĉiĝis" al homoj. Dum kvar horoj estis pridemanditaj 128 personoj.

La demandoj kaj respondoj estis jenaj:

1. *En kiu lingvo vi preferas paroli, ĉu en la ukraina, ĉu en la rusa?* Por 40 personoj estis pli facile paroli en la ukraina, por 109 – ruse, por 18 – en ambaŭ lingvoj.

2. *Ĉu vi rimarkas, ke ukrainajn vortojn oni ofte senbezzone anstataŭas per fremdlingvaj?* Tion rimarkas 93 kaj ne rimarkas 35.

3. *Ĉu povus neŭtrala lingvo Esperanto defendi la ukrainan?* (Cetere, por la homoj tiu demando estis tute neatendita). Tamen pozitive respondis 55 homoj! Negative respondis 45 homoj kaj 30 verŝajne ne komprenis la demandon.

4. *Se okazus disputo pri tiu temo, ĉu vi partoprenus ĝin?* Jes – 63, ne – 65.

Do ĉiu povas fari siajn konkludojn. Bedaŭrinde ni ne metis en la enketilon demandon pri ago de la homoj kaj poste evidentiĝis ke tio estas grava. Estas interese, ke signife pli multaj homoj nun scias, pri tio kio estas Esperanto.

Tio estas rezulto de nia aktiva pasint- kaj ĉijara ampleksa informado, farita en kadre de IJEK – Internacia Junulara Esperanto-Karavano. Eĉ unu laŭaspekte senhejmulo preterirante diris al mi: "Ha, mi scias, ke tiu lingvo komenciĝis en Bjalistoko" ...

M.Lineckij

lineckij@ukrpost.net
(El ret-info)

Monato

INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

22a JARKOLEKTO 2001

Informiĝu pri la okazontaĵoj en la nova 3a jarmilo pere de la internacia revuo MONATO. Ĝi raportas el ĉiuj anguloj de la mondo, tra la okuloj de lokaj loĝantoj kaj informos vin pri aspektoj kaj eroj kiujn aliaj naciaj kaj internaciaj revuoj en la mondo preteratentas. En la tuta Esperantujo ĝi estas unikajo, la nura revuo kiu plenumas la celon de Esperanto ĝisfunde: informi ne pri, sed per Esperanto.

Mendu la revuon ĉe la eldonanto
Flandra Esperanto-Ligo
Frankrijklei 140
B-2000 Antwerpen
BELGIO

EUR 39,00

Sten Svenonius
Vendelsfridsgr 4C
21764 Malmö

letero de la estraro

Epostadress — nytt medlemsförmån

Kan en epostadress som **mitt.namn@esperanto.se** ses som ett medlemsförmån? Säkert, om man är esperantist och vill med adressen visa det.

Så tänkte vi i styrelsen och undersökte om det gick att ordna. Jo, det gick! Så nu kan alla som är medlemmar i SEF ha en personlig esperanto-adress. Fast inte riktigt alla. Det gäller, än så länge, bara den som redan tar emot epost, privat eller genom sitt jobb. Men vi kollar vidare om det går att ordna för andra också.

Vad är det som gäller?

Först och främst ska man vara medlem i SEF; adressen gäller bara så länge som man är medlem.

Man ska, som sagt, ha ett epostkonto, dvs. en adress där man redan idag hämtar sin epost. All epost som skickas till **mitt.namn@esperanto.se** hamnar i detta kontos brevlåda.

Hur går det till?

Gå till sidan **www.esperanto.se/epost** och fyll i blanketten som visas på skärmen. Med ditt namn som utgångspunkt får du ett antal tänkbara alternativ att välja mellan, t.ex. **asa.naslund@esperanto.se** om ditt namn är Åsa Näslund. Ett meddelande med ditt val skickas till Ole Hansen som sköter SEF:s medlemsregister. Han kollar att du är medlem, bekräftar det i så fall, och du får ett meddelande när du kan börja använda din nya epostadress.

Om flera i din familj är medlemmar i SEF, men ni använder en gemensam epostadress för eposten, kan var och en av er ha sitt eget namn registrerat. Brevan hamnar fortfarande i er gemensamma brevlåda, men redan på adressen ser ni vem de riktas till.

Lätt att ändra eftersändningen

Om du byter slutadress, dvs. om du byter jobb eller leverantör, kan du själv ordna att eftersändningen går till en ny adress. På **www.esperanto.se/epost** klickar du på "Kolla dina privata inställningar". Genom att ange ditt epostnamn (**asa.naslund** i fallet ovan) och det lösenord som du använt vid registreringen, tas dina uppgifter fram och du kan ändra dem alla, utom själva epostnamnet. På detta sätt kan din epostadress hos esperanto.se tjäna som din fasta adress.

Javisst, vi höll på att glömma: det här kostar dig ingenting extra.

FÖRENINGSBREV



Esperantoförbundet, Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm

Esperantistoj prezentas sin mem

Prepari retejon pri si mem povas esti malfacile. Pli facile estas registri sian retadreson ĉe iu el la ekzistantaj registroj, se oni estas esperantisto. Sed tie ne eblas aldoni kromajn informojn pri si mem.

Ĉe **esperanto.nu** estas tial kreita **Retkartaro**, en kiu eĉ malspertaj retumantoj povas meti informojn pri si. Laŭ aspekto la unuopaj kartoj similas al vizitkartoj, en kiuj aperas la esencaj informoj: nomo, adreso, telefona numero, retadreso. Ekzistas ebleco aldoni duan karton, kiu povas enhavi mallongan priskribon kaj mension pri la personaj intereso.

Ĉar la kartoj enhavas privatajn informojn, ili ne estas publike konsulteblaj. Nur tiuj, kiuj aldonis karton pri si mem povas en **Retkartaro** serĉi informojn pri aliaj. "Ni disponigas utilajn informojn al vi, se vi reciproke kontribuas per informoj pri vi", estas

la klarigo donita en la prezento de **Retkartaro**.

La informoj en **Retkartaro** estas serĉeblaj laŭ pluraj kriterioj. Klako al landonomo prezentas liston de kartanoj el tiu lando. Serĉado de specifa vorto – ekzemple "papilio" – prezentas liston de kartanoj, kiuj interesiĝas pri papilioj kaj tion menciis en sia priskribo, kaj tiel plu.

La kartanoj povas facile aranĝi **Privatan kartaron** de konatuloj. Iliaj kartoj estos poste konsulteblaj per unu klako, kie ajn en la mondo.

Se la informoj sur la kartoj malaktualiĝis, ĉiu povas facile mem fari la bezonatajn ŝanĝojn. Se tia ŝanĝo temas pri iu en via **Privata kartaro**, ĉiam la aktualaj informoj montriĝos al vi.

Retkartaro troviĝas ĉe **http://esperanto.nu/kartaro/** kie eblas legi pli pri ĝi.

Franko Luin

Jen la kartoj pri SEF. Sur la dua karto ne multo estas skribita, sed pliaj informoj estas facile aldoneblaj. En Privata kartaro troveblas kelkaj membroj, kiuj jam aranĝis kartojn pri si mem.

retKARTARO
ESPERANTISTOJ EN LA RETO

Sveda Esperanto-Federacio
Landa asocio

Vikingagatan 24
SE-113 42 Stockholm
Svedio
Tel. +46 8 34 08 00
Fakso: +46 8 34 08 10

esf@esperanto.se
www.esperanto.se

privataKARTARO

Sveda Esperanto-Federacio

Franko Luin

Kjetil Henrik Randsheid

Wim Posthuma

Kalle Kniivilä

Janko Luin

Magnus Asplund

Nils-Erik Kristoferson

Ann-Kristin Krondahl

Stella Lindblom

Hokan Lundberg

Fondita en 1906. Membrogazeto: La Espero